Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**06-a de aŭgusto 2020, numero 9**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## La Estraro de UEA respondas




La 6-an de aŭgusto 2020 okazis la programero "La Estraro de UEA respondas". Aliĝintoj al la Virtuala Kongreso povas spekti ĝian registraĵon en la retejo de VK.

## Virtuala Ekspozicio Hiroŝimo-Nagasako: 75 jaroj por paco



Okazis la inaŭguro de la Virtuala Ekspozicio Hiroŝimo-Nagasako: 75 jaroj por paco: https://mondafest.net/hiroshimo. La ekspozicio inaŭguriĝas kadre de la Virtuala Kongreso de Esperanto (aliĝi eblas ĉe https://vk.mondafest.net) kaj en la 75-a Memortago de la Atombombado sur Hiroŝimo. La ekspozicio inaŭguriĝas per du salonoj: Memore (1) kaj Kleige (2). En la Salono 1, vizitantoj povos konatiĝi kun 70 fotoj kaj bildoj kolektitaj de la Eldon-komitato de Hiroŝimo-Nagasako. La salono estis kunordigita de Michela Lipari, prezidantino de Itala Esperanto-Federacio, al kiu UEA kore dankas. La Salono 2 proponas tri prelegojn, kiuj ebligas al esperantistoj konscii pri la graveco de la temo por paco. UEA kore dankas al Mirejo Grosjean, prezidanto de ILEI, kaj Osioka Taeko, hiroŝimano, pro la prezento de la prelegoj. La tri prelegoj okazas nun kadre de la Virtuala Kongreso kaj estas libere spekteblaj rekte en la ekspozicia paĝo kaj en la jutubkanalo de UEA, *UEAviva*: https://youtube.com/UEAviva. Jam *temp' está* por paco! **#mondafest2020**

## La Tago de Eŭropo okazos virtuale kadre de MondaFest'



La Tago de Eŭropo okazos virtuale kadre de MondaFest' 2020 kaj estos senpaga.

Pliajn detalojn vi povas trovi en la retpaĝo: https://eventaservo.org/e/Tago-Europo

La libroservo de UEA ofertas Esperanto-librojn kaj varojn: https://katalogo.uea.org

# Evoluigo kiel kolono de Unuiĝintaj Nacioj

Mark Fettes

**(Daŭrigo)**

Jam en la sesdekaj jaroj, do, evoluigo fariĝis klare demando de *nacia politiko*: unuavice, kiel kreskigi la ekonomion kaj plibonigi sanajn kaj edukajn sistemojn. Sed la nove sendependaj landoj frontis gigantajn problemojn sur tiu vojo, problemojn kiuj UN povis helpi difini kaj esplori sed ne mem solvi. La riĉaj landoj de la Nordo, ankoraŭ influitaj de la koloniisma pensmaniero, emis supozi, ke per supera scio kaj teknologio ili kapablas (aŭ bonvole, aŭ por antaŭenigi la proprajn interesojn) levi la malriĉajn landojn al sia nivelo. En tiu kredo rolis la kreskanta influo de ekonomiko, relative juna studfako kiu tamen ambiciis malkovri universalajn leĝojn de prospero kaj ekonomia mastrumado. Neeviteble, tiuj tendencoj esprimiĝis ankaŭ en la rondoj de UN. Nur iom post iom, en la sepdekaj kaj okdekaj jaroj, la persistado de malriĉeco, analfabeteco, malsato, epidemiaj malsanoj kaj aliaj problemoj montris la nesufiĉon de tiuj aliroj. Intertempe fariĝis ankaŭ pli kaj pli klare ke la ĝisnuna evoluiga vojo de la industriaj socioj kaŭzas gravajn damaĝojn al la naturo kaj ne estas senfine sekvebla, nek ĝeneraligebla al la tuta mondo.

Jam de ĉ. 40 jaroj, do, evoluigo estas pli kaj pli vaste traktata en la rondoj de UN kiel kompleksa, multflanka defio, por kiu ne ekzistas unuecaj solvoj. De Unesko, ekzemple, venis la koncepto de *kultura* evoluigo, t.e. ke la unikaj ecoj de ĉiu lando kaj popolo kondiĉas la eblajn vojojn al socia progreso. De la Evoluiga Programo de UN venis la koncepto de *homa* evoluigo, kune kun la t.n. Indekso de Homa Evoluigo, kiu mezuras tri indikojn de homa bonfarto por ĉiu lando: vivodaŭron, edukitecon, kaj enspezon. Kaj de la Raporto Brundtland kaj la konferencoj de UN pri naturprotektado venis la koncepto de *daŭripova* evoluigo, kiu serĉas ekvilibron inter ekonomiaj, sociaj kaj naturaj konsideroj. Mi menciu ankaŭ, ke diversaj kritikantoj ekster la rondoj de UN esprimis (kaj daŭre esprimas) dubojn pri la koncepto de evoluigo kiel tuto, argumentante ke ĝi restas esence koloniisma malgraŭ tiuj diversaj adaptoj.

En la jaro 2000, la ŝtatoj-membroj de UN akceptis komunan 15-jaran agadprogramon sub la nomo de la Jarmilaj Evoluigaj Celoj. La programo enhavis 8 ĉefajn celojn; inter ili, tri rilatis al vivnivelo (malriĉeco kaj malsato, baza edukado, seksa egaleco); tri al sano (fokuse al infanoj, patrinoj, kaj infektaj malsanoj, aparte aidoso); unu al la naturo (kun aparta emfazo pri trinkebla akvo kaj la vivkondiĉoj en faveloj, do fakte temis grandparte pri la homo *en* naturo); kaj unu al internacia kunlaboro, aŭ eble pli ĝuste internacia solidareco, ĉar la ĉefa celo estis krei pli favorajn financajn, ekonomiajn kaj teknikajn kondiĉojn por la pli malriĉaj landoj. Tiu listo altiris sufiĉe da kritiko, ĉar ĝi ŝajnas iomete arbitra kaj nebone argumentita; aliflanke, ĝi almenaŭ havis la meriton fiksi komunajn prioritatojn, kaj krome almenaŭ parte videbligi la plurflankecon de la defio. Kun la paso de la tempo, kreskis la sento ke tia listo de komunaj celoj havas politikan kaj praktikan utilon, kaj do en la jaro 2012 komenciĝis planado por sekvigi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn per nova, pli zorge preparita agadprogramo.

## La Celoj por Daŭripova Evoluigo

En tiuj jaroj post 2000, disvastiĝis konscio pri la urĝeco de la ekologia krizo kiel baro al evoluigo — plej frape, evidente, en rilato al klimatŝanĝiĝo, sed ankaŭ pli kaj pli pro la perdado de specioj kaj la kolapso de la nombroj de plantoj, insektoj kaj bestoj en vastaj zonoj de la tero kaj maro. Tio klarigas la decidon de UN, ligi la novajn celojn al la koncepto de daŭripova evoluigo. Teoriistoj de la daŭripovo emfazas, ke daŭripovaj socioj devas esti ankaŭ pacaj, stabilaj kaj justaj socioj, kie ĉiuj sentas sin sekuraj rilate al vivbezonoj kiel akvo, manĝaĵo kaj loĝado, kaj ankaŭ rilate al sia kultura identeco. Tial la nova celaro estas pli ampleksa ol la antaŭa, kun 17 ĉefaj celoj kaj 169 subceloj kun specifaj indikiloj. En ĉi tiu mallonga prelego mi povas nur resume paroli pri la ĉefaj celoj. Laŭ sugesto de interfaka teamo, oni povas koncepti ilin en tri grupoj, plus la lasta celo, kiu same kiel la lasta Jarmila Evoluiga Celo alvokas por tutmonda solidareco.

La unua grupo konsistas el celoj por vivsubtena *socia* bazo. Ili estas la plej proksimaj al la Jarmilaj Evoluigaj Celoj, kaj grandparte kovras la saman terenon. Temas pri:

- Celo 1. Forigi malriĉecon.
- Celo 3. Sano por ĉiuj.
- Celo 4. Bonkvalita edukado por ĉiuj.
- Celo 5. Seksa egaleco.
- Celo 10. Redukti socian kaj internacian malegalecon.
- Celo 16. Paco kaj justeco por ĉiuj.

La dua grupo konsistas el celoj por vivsubtena *materia* bazo, do socia infrastrukturo en vasta senco. Temas pri:

- Celo 2. Aliro al kaj mastrumo de manĝoproduktado.
- Celo 6. Aliro al kaj mastrumo de trinkebla akvo.
- Celo 7. Aliro al kaj mastrumo de energio.
- Celo 11. Aliro al kaj mastrumo de loĝado.

Celo 8. Aliro al kaj mastrumo de bonkondiĉa laboro.
Celo 12. Daŭripovaj konsumado kaj produktado.
Celo 9. Infrastrukturo, industrio, inventemo.

La tria grupo konsistas el celoj por vivsubtena *natura* bazo, do gardado kaj restarigo de naturaj sistemoj damaĝitaj de homa agado. Temas pri tri grandaj kampoj:

Celo 13. Kontraŭbatali klimatŝanĝiĝon.
Celo 14. Konservi kaj daŭripove utiligi la marojn.
Celo 15. Konservi kaj daŭripove utiligi la terojn.

Kaj, laste, kiel menciite, estas Celo 17. Plifortigi la realigajn kapablojn kaj revigligi la tutmondan partnerecon por daŭripova evoluigo.



Evidente ĉiu celo ne estas sendependa de ĉiuj aliaj celoj. Male, multaj estas proksime kunligitaj, kaj ofte en streĉa rilato inter si. Ekzemple, niaj ĝisnunaj sistemoj por liveri energion al loĝejoj, al agrikulturo kaj al industrio kaŭzas la problemon de klimatŝanĝiĝo; nia malŝpara utiligo de akvo kaj nia abunda uzado de kemiaĵoj por produkti manĝaĵojn grave damaĝas terajn ekosistemojn; niaj kutimoj de konsumado kaj produktado kaŭzas gravajn sanproblemojn. Vere do temas pri kompleksa tuto, kaj efektive *daŭripova* aliro al evoluigo devas konsideri ne nur la unuopajn celojn, sed la reformon de la socio por meti ilin kune ĉe la bazo de la politiko kaj ekonomio. En tiu lumo, ni povas diri, ke ĉiuj landoj estas evolulandoj, aŭ devus konsideri sin tiaj; ke neniu lando rajtas esti kontenta pri sia nuna situacio.

## Evoluigo kaj esperantistoj

Neniu surpriziĝas, kiam oni diras ke la Esperanto-movado estas pacmovado, aŭ movado por homaj rajtoj. La tiel nomata "interna ideo" de la lingvo, ke ĉiuj homoj estas gefratoj, facile ligiĝas al tiuj kolonoj de la agado de Unuiĝintaj Nacioj. Tamen, diri, ke la Esperanto-movado estas movado por evoluigo, eventuale por *daŭripova evoluigo* — nu, tio estas jam pli malfacila ideo por multaj movadanoj.

Aliflanke, ankaŭ por UN la ligo inter lingvo kaj evoluigo ŝajnas malevidenta. Inter la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo plene mankas mencio pri la multlingveco de la mondo, kaj la organizo malhavas sistemecan politikon pri la uzado de popolaj lingvoj en sia laboro. Kvankam foje aperas deklaroj, ekzemple, pri la graveco de edukado en la denaska lingvo, baza edukado en multaj malriĉaj landoj ankoraŭ okazas en la lingvoj de potenco en la koncerna lando, ne malofte eĉ en la ekskoloniaj lingvoj. Kaj tiuspecaj kontraŭdiroj aperas multloke sur la tereno de evoluigo, kiu reale estas ankaŭ, kiel ĉiam, afero de mono, povo kaj sociaj hierarkioj.

Tamen, kiel esperebla klariĝis per ĉi tiu mallonga enkonduko, la demandoj de daŭripova evoluigo *ne estas eviteblaj* en la nuntempa mondo; ili ĉirkaŭas nin ĉiujn. Kaj tio laŭ mi signifas, ke esperantistoj devas komenci levi siajn voĉojn ankaŭ sur ĉi tiu kampo. Zamenhof siatempe insistis, ke Esperanto ne volas tuŝi "la doman vivon de la popoloj," ke ĝia celo estas ĝuste helpi protekti tiun doman vivon de invado kaj detruo fare de pli grandaj kaj fortaj kulturoj kaj lingvoj. Sed la doma vivo de ni ĉiuj estas nun minacata de ekologiaj katastrofoj, de militoj kaj amasa malsato kiuj pelas milionojn da homoj al despera migrado, de ekonomiaj sistemoj kiuj pliakrigas la diferencojn inter riĉuloj kaj malriĉuloj, kaj tiel plu. Se ni ne aliĝas al la batalo por pli vivsubtena mondo, ni kvazaŭ lasas la etan velboaton Esperanto forvojaĝi sur ĉiam pli ŝtorma maro, ĝis ĝia neevitebla pereo.

La komencpunkto por niaj diskutoj ŝajnas esti klara. Kiuj evoluigaj problemoj estas plej senteblaj por ĉiu el ni, en nia propra loĝloko kaj -lando? Kaj kiuj problemoj plej gravas por niaj amikoj en aliaj landoj? Pere de niaj vastaj retoj de amikeco kaj kunlaboro, kio estas farebla por respondi al tiuj problemoj, por esprimi moralan kaj praktikan solidarecon trans landlimojn? Jam troviĝas belegaj ekzemploj de tia kunlaboro inter esperantistoj el diversaj landoj kaj kontinentoj: ni lernu pli pri ili, disvastigu tiujn rakontojn kaj modelojn, konstruu sur ili. Kaj eventuale la Celoj por Daŭripova Evoluigo povas inspiri novajn projektojn: ni interŝanĝu ideojn, informojn, spertojn, cele al novaj formoj de kunlaboro, novaj konkretiĝoj de la idealismo de Ludoviko Zamenhof kaj la praktika genio de Hector Hodler, cent jarojn post iliaj mortoj.

UN ne estas nur organizo de ŝtatoj, kvankam tio estas ĝia politika realo. Ĝi estas ankaŭ la kolektivo de ni, la popoloj de la mondo, la homaro. Kiel la portantoj de "lingvo neŭtrale homa," ni esperantistoj ŝuldas al UN niajn bondezirojn, nian kunpensadon, nian kunstrebadon. MondaFest' 2020 estu okazo por prikonscii, pridiskuti kaj plivastigi niajn kontribuojn al ĝiaj evoluigaj celoj.

Vi povas esti aŭtoro de la *Festivala Kuriero* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio
*redakcio@revuoesperanto.org*

# Unesko eldonis unuan libron en Esperanto "De ideoj al agoj: 70 jaroj de Unesko"




Danke al la kunlaboro de afablaj kaj helpemaj Unesko-oficistoj kaj danke al esperantistoj el sep landoj, la paralela Esperanto-ĉina versio de la Unesko-libro estas oficiale eldonita de Unesko kun UEA julie, antaŭ la VK-2020. En tio partoprenis precipe la Esperanta tradukisto kaj antaŭa vicredaktoro de *Unesko-Kuriero* en Esperanto, Andrej Peĉjenkin, la iniciatinto kaj ĉefredaktoro Trezoro, vicredaktoro François Lo Jacomo, la reviziintoj (Rob Moerbeek, Michela Lipari kaj Wang Fang) kaj la ĉinlingva traduka kaj revizia teamo de Trezoro. La eldonaĵo, kun Unesko-ISBN 978-92-3-000112-4 kaj UEA-ISBN 978-92-9-017138-6, aperis en formato 220x210 mm, kun 230 koloraj paĝoj kaj abundaj bildoj en kuproplata papero kaj malmola kovrilo.

Pliajn informojn trovu en la Gazetata Komuniko de UEA: https://uea.org/gk/896a1

# Ĉu ankaŭ vi fariĝos kerkedulo?

Fernando Maia

Ĉu ankaŭ vi fariĝos kerkedulo? :) Bestoj samkiel homoj estas tiel karaj al esperantistoj, eĉ kiam temas pri krokodiloj! ;) Ĉu vi cetere spektis la aŭtoran momenton kun Normand Fleury pri la "Besta Verbaro" en la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK)? Nepre re-spektu ĉe https://vk.retevent.com/prelegoj/mzQPutapswaY9Ykbi2c1 (se vi ne aliĝis al la VK, eblas ankoraŭ tion fari per https://vk.mondafest.net/). La etoso de kuraĝo kaj espero, kiun intencis doni la Monda Festivalo de Esperanto al nia komunumo, ja floras, tiel ke post serio da eventoj — NASK, IJK, SES/SEP, VEKI kaj nun VK, krom aliaj — esperantistoj jam demandas ĉu eblas konstante kongresumi. Se vi volas tion fari, tre verŝajne vi fariĝos kerkedulo! Kerkedulo, krom tiu ĉarma migra anaso, kiel instruas al ni Vikipedio (http://eo.wikipedia.org/wiki/kerkedulo), ankaŭ povas esti ĉiuj ni, kiuj volas ĝui Konstantan Esperantistan Retan Kongresumadon EnDome! :D kompreneble ĉiuj deziras reveni al ĉeestaj renkontiĝoj, sed ja eblas agnoski la gajnojn, kiujn ni kolektive sukcesis atingi restante hejme, solidare al la mondo. Kaj, kvankam la granda serio da eventoj de MondaFest' 2020 kulminas ĉe la VK, vero estas, ke la ĉeno ne rompiĝos: ankoraŭ multe da eventoj okazos kadre de MondaFest' 2020 kaj plu! Pri tio nepretervidebla estas la subteno de Eventa Servo al nia verda universo: vizitu la retejon, registriĝu kaj registru viajn eventojn. En ĝi ekde longe jam eblas konstati kiel bunta estas nia eblaro — la filtro Reta de la retejo montras al ni, kio



okazas rete: https://eventaservo.org/Reta. Dankon al ĉiuj amikoj de Eventa Servo kaj dankon al ĉiuj vi, ĉar vi estas ero de tiu ĉeno.

**Subteni la laboron de UEA eblas per aliĝo: https://uea.org/alighoj/alighilo**

## Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!